Christian Winther,

Ripozo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Foras la suno, la tago forplonĝas,
staras la nuboj jen ĉe l' ĉiel-rand',
lumas la steloj; dormetas kaj sonĝas
en trankvilego la mar' kaj la land'.

Aĥ, se mi povus, nun kiam finiĝos
mia viv-tago, - samkiel jen flor' –
turni kun fido, ĝis ree tagiĝos,
min al la juna matena aŭror'!

Traduko de la Dana poemo "Hvile" de Christian Winther *(Kristiano Vintero, ∗1796 – †1876) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984-10.04.*

MR-158-3 / Arg-244-494 (2004-06-10 11:11:55)